**Praha-ek-1991-1-01**



LOKA KONSISTAĴO DE ĈEA n-ro 1/1991 januaro 1991

Jana Cíchová

E G A L E C O

En preĝejo surgenue
helpon petis ambaŭ kune

ĉifonita bluz´,
lutreola pelt´.

Ambaŭ preĝis surgenue
pri la san´ petante kune

kapo jam per aĝo griza
kaj kapet´ peĉ-nigra bukla.

Ambaŭ pri la Di-faver´ sopiris
laŭ justeco Dio findecidis…

- x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x –

V Ý R O Č N Í Č L E N S K Á S C H Ů Z E
Klubu esperantistů v Praze
se koná v pondělí dne 18. února 1991 od 18.30 h

Účast všech členů klubu nutná!

Pri malgranda bonorda malordo

La malfeliĉo ne iradas al montaro sed al homoj, oni diras: kaj vere: mi neniam ankoraŭ en montaro renkontis malfeliĉon, sed tio ke ĝi renkontis min. Sed al homoj ĝi viros ĉiun momenton kaj okazos al homo edziĝinta, kiu estas per tiu okazo da feliĉo surŝutita kaj dorloĝita, ke la fonto de lia bonstato provizore malaperos kaj ke do, dirante ĝuste lia edzino forveturos por mallonga aŭ longa libertempo.

Poste sekvas tre malfacilaj momentoj, kiam la viro eniradas en loĝejon sen muziko kaj klareco. Li estas sola. Pli malbone: Li estas forlasita. Li mensogas al si la senton da ia imaginara libero, sed li dume ne scias, kiel ĝin utilit aŭ manifesti. Li venos ekzemple el antaŭĉambro en la ĉambron sen ŝanĝi la ŝuojn. Poste li ne estingos en banĉambro kaj manĝas bulkon irante, tiamaniere li enigas sur la tapiŝon. Ĉio ĉi tio ŝajnas al li ekzaltiga, aventura kaj ankaŭ certasence iomete heroa.

Poste li kuiros kafon, lasos la tason kaj kulereton sur la tablo kaj foriris.

Dum multe da jaroj de atenta observado mi venis al la opinio, ke aĵoj, lasitaj sur la difinita loko, tie restas. Neniam al mi okazis, ke iu ol ili laŭ propra iniciato, aŭ nur pro hontema, ke ĝi tie malhelpas, forlasas la lokon, kiu videble ne estas la loko de ĝi kaj forirus tien, kio ĝi apartenas. Vi diros al mi, ke tio ne estas ebla, ke aĵoj sur la malĝustaj lokoj malplimultiĝu kaj mi demandos vin, kiel do tio eblas, ke ili tie plimultiĝas. Post tri tagoj mi estis ĉirkaŭita de pli multe da tasoj ol mi povis bezoni kaj bezonis. Ili estas ĉie. Ili forlasis sian etaĝeron kaj disstariĝis sur la tablon, sur la seĝojn, sur la tabulon de fortepiano, sur fenestron, sur plankon kaj eĉ sur lokojn, kien neniu – despli mi – ilin starigus. La samo okazas kun teleroj, manĝilaroj, krajonoj, ĉemizoj, kaseroletoj, ŝuoj, libroj kaj kun ĉiuj bagatelaĵoj de taga kaj nokta bezono.

Okazos tia afero: meze de la tapiŝo en la loĝejo kuŝas ŝtrumpeto Ĝi estiĝis tie, mi ne scias kiel. Mi ne havas tempon sekvi la konduton de miaj ŝtrumpetoj. Se ili estis ambaŭ, mi povus esti en suspekto, ke mi tien ilin formetis. Sed la alia estas nevidebla. Kaj la unua estas tie – ĝi estiĝas malhelpaĵo, ekkrio, kalamito, problemo kaj tre malbonega disharmonio. Ĝi kuŝas tie tagon, du, semajnon. Mi rigardas ĝin en la momento de ekdormado kaj mia unua matena rigardo falas sur ĝin. Mi ĉirkaŭiras ĝin kaj transiras. Se mi sidas al ĝi dorsdirekte, mi estas de ĝi maltrankviligeta, kvazaŭ mi havus malantaŭ mi rabobeston aŭ serpenton. Mi antaŭvidas tion, ke ĝi unu tagon tie ne estos, tiel subite, kiel ĝi alian tagon tie estis, sed ĝi estas plu. Kaj kreskas.

Ĝi ne plu estas la ŝtrumpeto, kuŝanta en via ĉamro – ĝia malluma kaj trista ekzistado estas meze de viaj aĵoj, de via labora klopodo. Vi estas ekzemple kuracisto aŭ konstruisto. Aŭ laboristo. Profesoro de historio. Aŭ teatra aktoro. Aŭ ĉampiono de tiu ĉi ŝtato en ŝakludo. Do: la ŝtrumpeto en via ĉambro malhelpas al vi en la operacio, ĉar vi vidas ĝin en la interno de via paciento, ĝi malhelpas al vi en la desegnado de ponto, endanĝerigante unu el ĝiaj pilieroj. Ĝi trairas tra la materio de via laboro kaj gravuras vian paroladon pri la komencoj de la husita movado, ĉar ĝi flugpendas en la spaco de Betlehema kapelo. Vi aktoras Romeon kaj Julio havas ĝin en la frizaĵo. Vi defendas la kolorojn de via ŝtato sur la ŝatabulo, inter peonoj, ĝuste antaŭ la reĝo kuŝas via ŝtrumpeto. Vi povas tiri per ĉio ajn, ĉien ajn, la ŝtrumpeton fortiri vi ne povas.

Ĝi estiĝis demono.

La aĵoj plumultiĝas. Venas la tempo, kiam vi komencas perdi la supervidon. La kafon vi kuiras en malĝusta ujo kaj kirlas ĝin per krajono. Jam la trian tagon vi ne matenmanĝas, ĉar vi ne povas trovi la korktirilon kaj post via dorso estas la tago, kiam la resto de manĝoj kuŝantaj ĉie, allogos vian loĝejon bestaron. Iujn ŝrankojn oni ne povas malfermi, aliajn fermi, kaj sub la divano estas manĝilaroj. Ĝis tiu tempo vi povis distingi aĵon de aĵo, jak vi povis kun la tuta respondeco proklami, ke tio ĉi estas la profunda telero kaj tio ĉi male la jaketo de piĵamo. Poste laŭvice la aĵo unuiĝas kun la aĵo, ili reciproke intermiksiĝas, estiĝas kunkreskoj, novformoj kaj strangaj hibridoj kaj oni ne povas jam difini per la okuloj, nek apartigi per la manoj la partoj de vestoj disde la partoj de kuireja ekipaĵo. Kaj jen vi ekhavos la frenezan ideon aŭ intencon ordigi kaj renovigi la ordon.

La ordigo kaj ordo estas tre belaj vortoj. Blovas el ili harmonio, certeco, ĝojo kaj trankvilo. La nocio ordigo estas por vi klara: redoni ĉiun aĵon sur lokon propran por ĝi. Vi do komencos, sed tre baldaŭ vi ekkonos, ke viaj aĵoj jam perdis siajn proprajn lokojn, ke la lokoj jam forgesis pri siaj aĵoj kaj ke en via loĝejo estas tre pli multe da aĵoj ol lokoj. Vi prenas aĵon post aĵo, portadas ilin tien kaj reen tiel la leteristo kun malbona adreso kaj vi renkontas tiujn ĉi aĵojn ĉiam denove kaj ĉiam aliloke, ĉar ili ekkomprenis vian agadon kiel iaspecan ludon kaj ili komencas mem ŝanĝi sian lokon. Vi trairos ĉiujn ĉambrojn kun pladeto de itala salato en unu mano kaj kun kravato en la alia mano, vi trairos la tutan loĝejon dufoje, trifoje kaj subite vi jam ne scias, kio estas la pladeto kaj kio la kravato kaj kien apartenas la unua kaj kien la alia kaj kiel la homo vaganta en rondo tra polusa lando vi komencos dubi ne nur pri la senco de kravatoj kaj pladetoj, sed pri la senco de vi mem kaj pri la homaro entute.

Vi estas ĉirkaŭigita.

La aĵoj ĝis nun senpotencaj, silentaj, humilaj, sindonaj kaj fidelaj akiris superecon, forĉerpis aeron, troplenigis la spacon kaj kreskas, kreskas spirantaj, kriantaj kaj multiĝantaj: kaj la fortika tero de via loĝejo ŝanĝiĝas sub ilia pezo en torfejon, kiu englutas ĉion, inkluzive vin.

Mi mem jam faris kelkajn tiajn ordigojn kaj ekhavis la opinion, ke fari ĉiutage la ordon estas same sensaĝe kaj lacige kiel renovigi ĝin per unu ordigo post longa tempo, kaj mi fiksis al mi la regulon, kiun mi respektas, konfesas kaj rekomendas: la regulon de malgranda bonorda malordo.

La malgranda bonorda malordo mi nomas tiun ĉi situacion de aĵoj en la loĝejo, kiam mi ankoraŭ povas senerare diri, kie estas kiu ajn aĵo, kiam unu aĵo ĝis nun ne kovras alian aĵon kaj ne kuniĝas kun tria, kiam per nuda okulo, sen la ŝanĝo de pozicio de meblo vi povas kiam ajn supervidi la situacion, kiam vi ankoraŭ sekure perceptas ĉiujn aĵojn kaj la tutan ilian pozicion, kiam neniu aĵo ankoraŭ sian aspekton, kiam ĝi do ne estas kovrita per rusto, polvo, musko, ŝimo aŭ per partoj de viaj vestoj tiom, por ke oni devu ĝin malkovri, mini, prigrati aŭ alimaniere deŝiri.

Estu laŭdata la malgranda bonorda malordo. Oni povas teni ĝin dum vico da tagoj, dume la ordon oni ne povas havi eĉ dum kelke da horoj.

Kaj oni povas relative rapide transformi ĝin en la relativan ordon en la kazo de devo – se ekzemple la edzino anoncos, ke ŝi revennos pli frue ol ŝi origine supozis.

tradukis Inĝ. Khail

La 6-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio okazi sen Třebíč la 1-an kaj 2-an de decembro 1990

La kongreso akceptis novan statuton de ĈEA, laŭ kiu estos nova gvidorgano nomata „konsilantaro“, la kongresoj okazos ĉiun trian jaron kaj ĉiujare estos konferencoj. En la novelektita 7-membra konsilantaro estas ankaŭ kelkaj membroj de nia klubo.
La membro de la konsilantaro estas:
Inĝ. Petr CHRDLE – la prezidanto de la asocio
Inĝ. Vlad. DVOŘÁK – la vicprezidanto
Pavel POLNICKÝ – la vicprezidanto
Inĝ. Zdeněk PLUHAŘ – la sekretario
Inĝ. Vlast. KOČVARA – membro
Věra PODHRADSKÁ – membrino
Vlad. HASALA – membro
La prezidanto de revizia grupo fariĝis L. BALLA.

La IFEF-kongreso okazos inter la 11-a kaj 18-a de majo en Olomouc, la postkongreso estos en Žilina.
La tradicia Ercmontara renkontiĝo de ĉeĥaj kaj germanaj esperantistoj okazos 22. – 27. 9. 1991 en Pernink.
La E-klubo en Benešov aranĝos 2-tagan renkontiĝon de esperantistoj en Samĕchov ĉe Sázava fine de aprilo.

**Praha-ek-1991-1-04**



Jozefo Adalši

POEMO POR MIAJ FUTURAJ LEGANTOJ

Sidanta aŭtune sub arbo
(kie frukto estas dolĉa pom´)
mi observas strecogarde
legontojn miajn en estonto

Jen mi vidas vin ronkanta dormi
Granda ŝoko estas tio por mi
Por vi paradizajn ĝojojn mi planis
esperante vian spiriton formi
Vi dormas. Ĉio vanis.

Jes kion mi verkis ŝvite dek jarojn
vi aprezas: nevendebla varo
Via dormo kaŭzas ke ĉio estas vana
Virinoj nudaj vin interesas pli aŭ ĉu ne?

Ne perdu emon miajn versojn legi
mi promesas future por vi
rikane aŭ hetajre danci
kaj se vi ege deziros ankaŭ gejŝi
Vin virinojn ĉaste virgajn mi promesas
Nur per imagoj perforti

Jaroslav Mařík:

Sherlock Holmes kaj Bohemio

La verkoj pri Shelock Holmes estas popularaj tutmonde. Societoj de amikaro de la fama detektivo ekzistas en Ameriko, Eŭropo, Aŭstralio, Novzelando, Japanio k. a. En la lasta estis inaŭgurita (1988) bronza statuo de S. H.

La japanaj holmesologoj estas tre aktivaj (ekspozicioj, prelegoj, amaskomunikiloj). La holmesologo Kiyoshi Tanaka prezentis en la televido parton de siaj kolektoj kaj menciis ankaŭ pri ĉeĥaj holmesaĵoj por infanoj, kiuj aperas en porinfana revuo Čtyřlístek (Kvarfolio). Antaŭ nelonge aperis beleta libro de Tanaka (25 us. dol.), siaspeca holmesologia enciklopedio (faktoj, mapoj, fotoj de lokoj, kvizoj). Sur la p. 229 estas ankaŭ foto de la PRAHA KASTELO, eĉ kun ĉeĥa subtitolo.

Kia? Nu ja tial, ke la unua holmesa rakonto havis titolon SKANDALO EN BOHEMIO! Ĝi estis publikigita en la magazino The Stran den julio 1891. En la nuna jaro, la SKANDALO EN BOHEMIO iĝos 100-jara!

Dum pri Japanio estas en la verkaro neniu mencio, escepte ioman scion de Holmes pri la japana luktospeco „baricu“, pri Prago jak Bohemio minimum dekfoje eni parolas.

Kion vi pensas: ĉu ne konvenus iel omaĝi al la datreveno de SKANDALO EN BOHEMIO? Ekzemple per fondo de Ĉeĥa societo pri Sherlock Holmes…

(laŭ gazeto Signál)

Ĉu vi volas vojaĝi al la 76-a Universala Kongreso de Esperanto 27.7. – 3. 8. 1991 en Bergen (Norvegio)?


La turisma kominisono de ĈEA preparis komunan ekskurson. La supozata prezo estas 15 000,-- Kčs. Oni loĝos en studenta hejmo. Aliĝu baldaŭ al la adreso: Turistická komise ČES, UK Bergen, Jilská 10, 110 00 Praha 1.

La dato de via aliĝo influos la sumon de la kongreskotizo.En la aliĝilo skribu ne nur vian nomon kaj adreson, sed ankaŭ la daton de via naskiĝo (kaj lokon), vian profesion kaj numeron de via pasporto. Skribu ankaŭ, ĉu vi estas individua membro de UEA kaj ĉu vi havas rabatitan fervojan vojaĝadon.

**Praha-ek-1991-1-05**



Krucenigmo de Ivan Slávik




Kiel atingi la celon…

Horizontale: 1. Unua parto de la kaŝfrazo. 2. Spirebla gaso ĉirkaŭ la tero – numera esprimo de kvanto aŭ grado de taksebleco (radiko). 3. Granda laŭ vertikála direkt supren – tuto de la sinsekvaj generacioj de unu sama familio konsiderata kiel devianta de unu sama prapatro (gento) – franca mallongigo por GDR. ,4. Demanda pronomo – plenumi agon, agi iamaniere – vira baptonomo (radiko). 5. Oksido de karbeno – kvara parto de la kaŝfrazo – cento. 6. Finaĵo de adverboj – fatalo – moviĝis sur piemoj – malkonsento. 7. Italaj moneroj – est´ ĉirkaŭanta la bruston – kunven´ dum kiu oni dancas kaj amuzas. 8. Oksigeno, litio kaj nitrogeno – konifera arb´- meblo por sidi. 9. Sur iu loko – mallonga memoriga skriba resum´- donanta aŭ ricevanta vivan lumon, lumpána. 10. Postulas sian rajton.

Vertikale: A. Dua parto de la kaŝfrazo. B. Parto de la homa korpo ekde kolo ĝis koksoj – vira baptonom´. C. Plektaĵo kun grandaj interspacoj inter la fadenoj aŭ ŝnuroj – profesio, okupo, al kiu oni sin dediĉas (radiko). D. Farita el valora metalo – kvant´ da lumo en fiziko – tria parto de kaŝfrazo (ankaŭ malkonsento). E. Greka litero – amfibiaj bestetoj – vaz´ por kuiri. F. Mezepoka eŭropa nomad ´- esprimite per vortoj. G. Iri tra aŭ preter iu lok opor atingi alian – flava ekskrementa likvaĵ´- hidrogeno kaj nitrogeno. H. Instrumento – proviz´ per ĉiuj necesaj iloj – kunordiga konjukcio montranta kontraŭecon aŭ diferencon inter tio kio antaŭas kaj tio kio sekvas. I. Ripozas kun fermitaj okuloj – plaĉanta al vido. J. Estis blanka varma, brulegis, estis tro pasia – moviĝas en fluaĵo. K. Kvina kaj lasta parto de la kaŝfrazo.

(verkis Inĝ. Ivan Slávik CSc., Fučíkova 1, 018 51 Nová Dubnica)

**Praha-ek-1991-1-06**



PROGRAMO DE KUNVENOJ DE LA ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

| | | |
|---|---|---|
| 7. 1. | Promenoj tra Prago | - Patera |
| 14.1. | Vojaĝimpresoj kajkontaktoj kun esperantistoj | - D-ro Čečelín |
| 21.1. | Libera tribuno | - ĉiuj |
| 28.1. | Unu monato en Kalifornio (kun diapozitivoj) | - Inĝ. Trojan |
| 4. 2. | Promenoj tra Prago | - Patera |
| 11.2. | Jan Neruda kaj liaj Kosmaj kantoj | - prelegas Mráz<br>- deklamas Seemannová |
| 18.2. | Jarkunveno de la klubo | - ĉiuj! |
| 25.2. | Libera tribuno | - ĉiuj |
| 4.3. | Promenoj tra Prago | - Patera |
| 11.3. | Internacia Tago de Virinoj | - ĉiuj |
| 18.3. | Gramatiko en kubo | - Seemannová |
| 25.3. | Libertempo en Italio | - Hubnová |
| 8.4. | Promenoj tra Prago | - Patera |

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

La kunvenoj okazas ĉiam de la 18.30 h en la klubejo en Vejvodova-strato

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Esperanto-centro en Poprad proponas:
SKISEMAJNO – 9. – 15.2.1991, Poprad, 1 074,-- Kčs
Vintra E-renkontiĝo VERAT-91 – 22.-24.3.1991, Poprad, 358,-- Kčs
Vintra E-lernejo – 16.2.-1.3.1991, Poprad, 2 327,-- Kčs
Printempa E-renkontiĝo PERAT – 7.- 9.5.1991, Poprad, 358,-- Kčs
Somera E-lernejo je SEL ´91 – 20.7.-2.8./3.-16.8./17.-30.8.1991, Poprad, 2 327,-- Kčs
Turisma Semajno en Slovakia Paradizo TUSE-91, 20.-26.7.1991, Spišská Nová Ves, 1 074,-- Kčs
Mikologia seminario – 14.-19.9., Poprad, 895,-- Kčs
Aŭtuna Subtatra Semajno (Altmontara turismo) – 22.-27.9.1991, Poprad, 895,-- Kčs
Plue oni povas mendi individuajn restadojn en Poprad, 1 tago – 179,-- Kčs (plena pensiono, leĝado, informaterialoj). Detalajn informojn sendos al vi la E-Centro Poprad, CS-058 01 Poprad.

Monda Turismo
realigos en la j. 1991 peraŭtobusajn rondvojaĝojn tra ok landoj – Pollando, ĈSFR, Hungario, Jugoslavio, Bulgario, Turkio, Rumanio, USSR – t. n. ESPERANTO-KARUSELVOJAĜOJ.
Entute estos 25 vojaĝoj 15-tagaj en diversaj templimoj, ĈEA havos je dispono ĉiam 4 lokojn. Detalajn informojn sendos al vi la turisma komisiono de ĈEA aŭ rekte la organizanto: ESPERANTOTUR, str. M. Skledowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgosz, Poll.

23a INTERNACIA RENKONTIĜO NATURAMIKA en Hungario
13.-22.7.1991 en somerumejo Abaliget
Informojn petu ĉe: Departementa Komitato de HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO, H-7601 Pécs, Pf.2

Pluajn interesajn kaj finance senpretendajn aranĝojn
Preparas la JUNULARO de ĈEA – regulajn informojn vi havos, se vi mendos la junularan CIRKULERO.
Informu vin ĉe: ČES, Jilská 10, 110 00 Praha 1.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

B U L T E N O - eldonas Esperantista Klubo Praha, p. k. 1069, 111 21 Praha 1 – por siaj membroj.
Redaktas redakta komitato.